

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
stampato da **afena.net** - Grisignano di Zocco (VI)

Anno 95 - n. 1
GENNAIO-FEBBRAIO 2016

49^a Monda Tago de la PACO

1a de Januaro 2016

VINCI L'INDIFFERENZA E CONQUISTA LA PACE

Sintesi del messaggio del Papa:

Nell'introduzione papa Francesco ci ricorda che Dio non è indifferente. Dio non abbandona l'umanità, ma la pace che è un dono di Dio, è anche opera degli uomini

Custodire le ragioni della speranza

Dopo un anno funestato da guerre, terrorismo, sequestri di persona, persecuzioni e prevaricazioni, il papa ci esorta a non perdere la speranza nella capacità dell'uomo che, con la grazia di Dio, può superare il male. Sono motivo di speranza gli incontri internazionali sul clima e sullo sviluppo sostenibile al fine di assicurare un'esistenza più dignitosa per tutti. Nel 50° anniversario della pubblicazione di due documenti del Concilio Vaticano II: *Nostra Aetate* e *Gaudium et Spes*, espressioni di un impegno della Chiesa nel dialogo e nella solidarietà, si sono

aperte le porte del Giubileo della Misericordia: un invito a pregare e lavorare perché ogni cristiano possa maturare un cuore umile, compassionevole.

VENKU LA INDIFERENTECON KAJ KONKERU LA PACON

Resumo de la mesaĝo de la Papo:

En la enkonduko, papa Francisko, memorigas al ni, ke Dio ne estas indiferenta. Dio ne forlasas la homaron, sed la paco, kiu estas dia donaco, estas ankaŭ homa verkaĵo

Gardi la pravigojn de la espero

Post jaro afliktita de militoj, terorismo, trudkaptoj de personoj, persekutoj kaj perfortoj, la papo insti-

gas nin ne perdi la esperon en la kapablo de la homo, kiu, pere de la dia graco, kapablas supervenki la malbonon. Estas motivo de espero la internaciaj renkontiĝoj pri la klimato kaj pri la subtenebla evoluigo celantaj garantii plej dignan estadon por ĉiuj. En la 50-a datreveno de la eldono de du dokumentoj de la Dua Vatikana Koncilio: *Nostra Aetate* kaj *Gaudium et Spes*, esprimoj de engaĝiĝo de la Eklezio en la dialogo kaj solidareco, malfermiĝis la

pordoj de la Jubileo de la Mizerikordo: t.e. invito preĝi kaj labori cele, ke ĉiu kristano povu maturigi humilan kaj kompateman koron.



Alcune forme di indifferenza

La prima forma di indifferenza è quella verso Dio, dalla quale scaturisce l'indifferenza verso il prossimo e verso il creato. L'indifferenza nei confronti del prossimo assume diversi volti. C'è chi è ben informato, conosce i drammi che affliggono l'umanità, ma non si sente coinvolto. L'aumento delle informazioni spesso ci anestetizza di fronte alla gravità dei problemi fino ad incolpare i poveri e i paesi poveri dei propri mali. In altri casi, l'indifferenza si manifesta come mancanza di attenzione: quando noi stiamo bene ci dimentichiamo degli altri. L'indifferenza verso il creato, con l'inquinamento delle acque e dell'aria, la distruzione dell'ambiente, sono frutto dell'indifferenza dell'uomo verso gli altri.

L'indifferenza globalizzata minaccia la pace

L'indifferenza verso Dio induce l'uomo a non riconoscere più alcuna norma al di sopra di sé e a prendere come norma soltanto sé stesso. Questo genera l'indifferenza verso il prossimo. Ne conseguono situazioni di ingiustizia e grave squilibrio sociale che poi sfociano in violenze e insicurezza. Quando le popolazioni vedono negati i propri diritti elementari, quali il cibo, l'acqua, l'assistenza sanitaria o il lavoro, sono tentate di procurarsi con la forza.

Dall'indifferenza alla misericordia: la conversione del cuore

Caino dice di non sapere che cosa sia accaduto a suo fratello. Non si sente coinvolto. Questa fu la prima manifestazione dell'indifferenza tra fratelli. Dio, invece, non è indifferente: fin dagli inizi dell'umanità si rivela come Colui che si interessa alla sorte dell'uomo. È determinante per la Chiesa e per la credibilità del suo annuncio che essa viva e testimoni in prima persona la misericordia. Chiunque deve poter trovare un'oasi di misericordia nelle nostre parrocchie, nelle comunità, nelle associazioni, nei movimenti e dovunque vi sono dei cristiani. Siamo chiamati a fare dell'amore, della compassione, della misericordia e della solidarietà un vero programma di vita, uno stile di comportamento, un impegno perseverante per il bene di tutti e di ciascuno.

Promuovere una cultura di solidarietà e misericordia per vincere l'indifferenza

La solidarietà esige un impegno da parte di una

Kelkaj formoj de indiferenteco

La unua formo de indiferenteco estas tiu direkta al Dio, el kio fontas la indiferenteco al la proksimumo kaj al la kreitaĵo. La indiferenteco rilate al proksimumo prezentiĝas en malsamaj formoj. Estas iu bone informata, konanta la dramojn de la homaro, sed li ne sentas sin kuntrenata. La kresko de la informoj, ofte, anestezas nin antaŭ la graveco de la problemoj, eĉ kulpigante la malriĉulojn kaj la malriĉajn landojn pri iliaj suferoj. Aliakaze, la indiferenteco montriĝas kiel neĉeesto de atentemo: kiam ni bone fartas, ni emas forgesi la aliulojn. La indiferenteco rilate al la kreitaro, kun la poluado de la akvoj kaj de la atmosfero, la detruo de la medio, estas frukto de la indiferenteco de la homo rilate al la aliuloj.

La tergloba indiferenteco minacas la pacon

La indiferenteco rilate al Dio, kondukas la homon ne plu rekoni ajnajn normojn super si kaj akiri, kiel normon nur sin mem. Ĉi tio estigas indiferentecon rilate al proksimumo. De tio sekvas situacioj de maljusteco kaj grava socia perturbo, kiuj finiĝas en perfortojn kaj malsekurecojn. Kiam la popoloj ekkonscias pri la neado de iliaj bazaj rajtoj, kiaj la nutraĵo, la akvo, la sanitara asistado aŭ la laboro, ekaperas en ili la tento akirigi ilin pere de la forto.

De la indiferenteco al la mizerikordo: la konvertiĝo de la koro

Kaino asertas ne scii kio okazis al sia frato. Li ne sentas sin interesiĝinta. Ĉi tio estis la unua manifestado de indiferenteco inter fratoj. Dio, male, ne estas indiferenta: jam de la komenciĝo de la homaro, li sin montras kiel tiu, kiu interesiĝas pri la sorto de la homo. Estas decide por la Eklezio kaj por la kredindeco de ĝia anonco, ke ĝi mem travivu kaj atestu sian mizerikordon. Iu ajn devas havi la eblon trovi oazon de mizerikordo en la paroĥejoj, en la komunumoj, en la asocioj, en la movadoj kaj kie ajn estas kristanoj. Ni estas alvokataj fari el la amo, el la kompato, el la mizerikordo kaj el la solidareco veran vivprogramon, sintenan stilon, persistan sindevigon por la bono de ĉiuj kaj de ĉiu.

Antaŭenigi kulturon solidaran kaj mizerikordan por venki la indiferentecon

La solidareco postulas sindevigon fare de multob-

molteplicità di soggetti, che hanno responsabilità educative. In primo luogo le famiglie che costituiscono il primo luogo in cui si vivono e si trasmettono i valori dell'amore, della fraternità, della convivenza e della condivisione. Poi gli educatori consapevoli che i valori della libertà, del rispetto reciproco e della solidarietà possono essere trasmessi fin dalla più tenera età. Anche gli operatori culturali e dei mezzi di comunicazione hanno responsabilità in questo campo, essendo strettissimo il legame tra educazione e comunicazione.

La pace: frutto di una cultura di solidarietà, misericordia e compassione

Il Papa ricorda le tante organizzazioni che, in occasione di calamità o conflitti armati, affrontano fatiche e pericoli per curare i feriti e gli ammalati e per seppellire i defunti, soccorrere i migranti. Ricorda anche i giornalisti e i fotografi che informano l'opinione pubblica sulle situazioni difficili che interpellano le coscienze, senza dimenticare i tanti sacerdoti e missionari che restano accanto ai loro fedeli e li sostengono nonostante i pericoli e i disagi. Queste sono opere di misericordia, sulle quali saremo giudicati al termine della nostra vita.

Nel segno del Giubileo della Misericordia

Nello spirito del Giubileo della Misericordia, ciascuno è chiamato ad adottare un impegno concreto per contribuire a migliorare la realtà in cui vive, a partire dalla propria famiglia, dal vicinato o dall'ambiente di lavoro. Anche gli stati sono chiamati a gesti concreti nei confronti delle persone più fragili delle loro società, come i prigionieri, i migranti, i disoccupati e i malati, senza dimenticare le loro relazioni con gli altri popoli, affinché si realizzi la fraternità anche all'interno della famiglia delle nazioni. Concludendo il papa pone agli stati tre richieste: astenersi dalle guerre, condonare i debiti dei paesi più poveri, garantire il diritto alla vita dei nascituri.

laj subjektoj, kiu havas edukon respondecon. Unue la familioj, kiuj konstituas la unuan edukon, kie oni travivas kaj transdonas la valorojn de amo, frateco, kunvivado kaj kunpartigo. Poste la edukistoj konsciantaj, ke la valoroj de libereco, de la reciproka respekto kaj de la solidareco povas esti transdonataj jam en la plej frua infanaĝo. Ankaŭ la operaciantoj en la kampo de la kulturo kaj de la informiloj havas respondecon en ĉi tio, ĉar estas tre strikta la ligo inter la edukado kaj la komunikado..

La paco: frukto de kulturo de solidareco, mizerikordo kaj kompato

La papo citas la multajn organizojn, kiuj okaze de plagoj aŭ militaj konfliktoj, alfrontas penojn kaj danĝerojn por flegi la vunditojn kaj la malsanulojn, por enterigi la mortintojn, zorgi pri la migrintoj. Li memorigas ankaŭ la ĵurnalistojn kaj la fotistojn, kiuj informas la publikan opinion pri la aĉaj situacioj, kiuj pridemandas la konsciencojn, sen forgesi la multajn pastrojn kaj misiistojn, kiuj restas apud siaj fideluloj kaj subtenas ilin, malgraŭ la danĝeroj kaj la malagrabloj. Ĉi tiuj estas agoj, pri kiuj ni estos juĝataj je la fino de nia vivo.

En la signo de la Jubileo de la Mizerikordo

En la spirito de la Jubileo de la Mizerikordo, ĉiu estas vokata por surprizi konkretan engaĝiĝon cele de la plibonigo de la mondoparto, en kiu li vivas, komencante de sia familio, de la najbararo aŭ de la labora medio. Ankaŭ la ŝtatoj estas alvokataj al konkretaj iniciatoj favore de la plej malfortikaj homoj de sia societo, precipe de la malmal-liberuloj, de la enmigrintoj, de la senlaboruloj, de la malsanuloj. sen forgesi siajn rilatojn kun la aliaj popoloj, cele starigi fratecan etoson ene de la internacia familio. Fine la papo starigas al la ŝtatoj tri postulojn: sin deteni de la militoj, formeti la ŝuldojn de la plej malriĉaj landoj, garantii la rajton al la vivo de la naskontoj.



Il testo completo in: <http://w2.vatican.va/content/francesco/it/messages/peace/index.html>

LA REDAZIONE AUGURA A TUTTI UN FELICE 2016

Settimana di preghiera per l'Unità dei Cristiani (18-25 gennaio 2016)

**“Chiamati per annunziare a tutti le
opere meravigliose di Dio”**

(cfr. 1 Pietro 2,9)

Il tema quest'anno ci viene proposto dai cristiani della Lettonia ed è preso dalla prima lettera di Pietro (2, 9-10):

Ma voi siete stirpe eletta, sacerdozio regale, nazione santa, un popolo che Dio ha acquistato per sé, per annunziare a tutti le sue opere meravigliose. Egli vi ha chiamati fuori delle tenebre, per condurvi nella sua luce meravigliosa.

Un tempo voi non eravate il suo popolo, ora invece siete il popolo di Dio. Un tempo eravate esclusi dalla misericordia, ma ora avete ottenuto la sua misericordia.

La Lettonia è di nuovo indipendente dopo la caduta dell'Unione Sovietica nel 1991. Nei decenni dopo la seconda guerra mondiale con il suo popolo oppresso da un regime totalitario e ateo, i cristiani di ogni confessione (luterani, battisti, ortodossi e cattolici), che in passato si erano combattuti, hanno scoperto la comune appartenenza al “popolo regale di sacerdoti” e si sono riuniti in una comune testimonianza del Vangelo fino al martirio. Per questo ora, molti cristiani si riuniscono in spirito ecumenico per pregare insieme.



Preĝ-semajno por la Unueco de la Kristanoj (18-25a de Januaro 2016)

**“Vokitaj por anonci al ĉiuj
la mirindaĵojn de Dio”**

(kp. 1 Petro 2,9)

La ĉijara temo estas proponata de la kristanoj de Latvio, kaj ĝi estas elĉerpita de la unua letero de Petro (2, 9-10):

Sed vi estas gento elektita de Dio, reĝa pastra popolo, nacio sankta, popolo akirita de Dio por si, por anonci al ĉiuj liajn mirindajn farojn. Li vokis vin el mallumo por vin konduki en sian lumon mirindan.

Iam vi ne estis lia popolo, sed nun vi estas popolo de Dio. Antaŭe vi estis forigitaj el la mizerikordo, sed nun vi ricevis lian mizerikordon.

Latvio reakiris sian politikan sendependecon post la disfalo de Sovet-unio en 1991. En la jardekoj post la dua mondmilito, kiam ĝia popolo estis subpremata de reĝimo totalisma kaj ateista, la kristanoj de ĉiuj konfesi-oj (luteranoj, ortodoksoj, baptistoj kaj katolikoj), kiuj pasintec batalis unu kontraŭ la alia, malkovris sian komunan apartenon al la “reĝa pastra popolo” kaj estis unuiĝintaj en komuna atesto de la Evangelio ĝis la martiriĝo. Pro tio, nuntempe multaj kristanoj renkontiĝas en ekumena etoso por preĝi kune.

I testi, in varie lingue, per la preparazione della Settimana di Preghiera si possono trovare qui:
www.vatican.va/roman_curia/pontifical_councils/chrstuni/sub-index/index_weeks-prayer_it.htm



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

CONCEDI A NOI MISERI

È bellissimo vedere i genitori che provano piacere a rallegrare i loro bambini, desiderando il loro bene e la gioia. Ma quando un bambino cerca di fare quello che piace alla mamma e al papà, allora la gioia dei genitori, e anche la nostra, va alle stelle. Sono belle esperienze quando ci accorgiamo che Dio continua a fare cose meravigliose per piacere agli uomini: con i comandamenti infatti ci ha dato le indicazioni necessarie per una vita felice e sana. In seguito a questo non si vede altra risposta onesta se non quella di fare quello che piace a Dio.

San Francesco d'Assisi, al termine di una sua calda lettera scritta "A tutto l'Ordine" dei Frati Minori, propone una bellissima preghiera che riassume il più autentico progetto di vita cristiana, sgorgato da un cuore innamorato di Dio, costruito sulla riconoscenza per i doni ricevuti e sul desiderio di fare «*ciò che a Dio piace di più*», come suggerisce Papa Bergoglio nella sua prima catechesi fatta dopo l'apertura del Giubileo della Misericordia. Questa la preghiera di san Francesco: «*Onnipotente, eterno, giusto e misericordioso Iddio, concedi a noi miseri di fare, per tuo amore, ciò che sappiamo che tu vuoi, e di volere sempre ciò che a te piace, affinché, interiormente purificati, interiormente illuminati e accesi dal fuoco dello Spirito Santo, possiamo seguire le orme del tuo Figlio diletto, il Signore nostro Gesù Cristo, e, con l'aiuto della tua sola grazia, possiamo*

EBLIGU AL NI MIZERULOJ

Estas tre bele vidi la gepatrojn, kiuj havas plezuron, kiam ili ĝojigas siajn infanojn, dezirante iliajn bonon kaj ĝojon. Sed kiam infano klopodas fari tion, kio plaĉas al la patrino kaj al la patro, tiam la ĝojo de la gepatroj, kaj eĉ la nia, leviĝas ĝis la steloj. Estas belaj spertoj, kiam ni ekvidas, ke Dio daŭrigas fari mirindaĵojn por plaĉi al la homoj: per la ordonoj, fakte, li donis al ni ĉiujn la necesajn indikojn por feliĉa kaj sana vivo. Sekve de ĉi tio oni ne vidas alian honestan respondon, krom fari tion, kio plaĉas al Dio.

Sankta Francisko el Asizo, konklude de varma letero skribita "Al la tuta Ordono" de la Minoraj Fratoj, proponas tre belan preĝon, kiu resumas la plej aŭtentikan projekton de kristana vivo, ŝprucantan el koro enamiĝinta al Dio, konstruata sur la dankemo pro la ricevitaĵoj donacoj kaj sur la deziro fari «*tion, kio al Dio plaĉas pli multe*», kiel sugestas Papo Bergoglio en sia unua katekizado farita post la malfermo de la Jubileo de la Mizerikordo. Jen la preĝo de Sankta Francisko: «*Ĉiopova, eterna, justa kaj mizerikorda Dio, ebligu al ni mizeruloj, ke ni faru, per via amo, tion, kion ni scias, ke vi volas, kaj ĉiam volu tion, kio al vi plaĉas, por ke ni, intime purigitaj, interne lumigitaj kaj ekbruligitaj de la fajro de la Sankta Spirito, povas sekvi la spurojn de via plej amata Filo, nia Sinjoro Jesuo Kristo, kaj, per la helpo de via sola graco, ni povu alveni al vi, ho*

giungere a te, o Altissimo, che nella Trinità perfetta e nell'Unità semplice vivi e regni e sei glorificato, Dio onnipotente, per tutti i secoli dei secoli. Amen. (FF 233).

Bella coincidenza! Una consonanza di intenti e di propositi tra San Francesco e questo Papa che ha indetto un Anno Santo come un tempo *«privilegiato perché la Chiesa impari a scegliere unicamente “ciò che a Dio piace di più”*. E, che cosa è che *“a Dio piace di più”*? Perdonare i suoi figli, aver misericordia di loro, affinché anch'essi possano a loro volta perdonare i fratelli, risplendendo come fiaccole della misericordia di Dio nel mondo... Niente è più importante di scegliere *“ciò che a Dio piace di più, cioè la sua misericordia, il suo amore, la sua tenerezza, il suo abbraccio, le sue carezze!”*.

Ecco come il Papa sogna la riforma della Chiesa e delle sue istituzioni! E san Francesco si è sempre presentato come un riformatore della Chiesa, come un restauratore che si ispira direttamente a Dio, chiedendogli di *«fare, per tuo amore, ciò che sappiamo che tu vuoi, e di volere sempre ciò che a te piace»*, e invitando tutti a dare il loro piccolo contributo.

Nell'Anno Santo della misericordia noi Esperantisti siamo invitati prima di tutto a ringraziare Dio per il dono della lingua internazionale Esperanto, coltivandola come un tesoro da mettere a disposizione dell'umanità in ricerca di una più immediata comunicazione fra tutti. E per esprimere meglio questa riconoscenza possiamo sentire l'impegno di avvicinare le persone che si sentono emarginate, escluse dalla gestione della vita sociale, in difficoltà a farsi capire e a capire. Anche la nostra preghiera può diventare una convinta richiesta di fare *«ciò che a Dio piace di più»*.



Plejaltulo, kiu en la perfekta Triunuo kaj en la simpla Unueco vivas kaj regnas kaj estas glorata, ĉiopova Dio, por ĉiuj jarcentoj de jarcentoj. Amen» (FF 233).

Bela koincido! Harmonio de celoj kaj intencoj inter Sankta Francisko kaj tiu ĉi Papo, kiu anoncis Sanktan Jaron kiel tempon *«privilegian por ke la Eklezio lernu elekti sole “tion, kio al Dio plaĉas pli multe”*. Kaj, kio estas, *“kio al Dio plaĉas pli multe”*? Pardonu siajn filojn, kompati ilin, por ke ankaŭ ili povu siavice pardonu la fratojn, brilante kiel torĉoj de la mizerikordo de Dio en la mondo... Nenio estas pli grava ol elekti *“tion, kio al Dio plaĉas pli multe”*, tio estas: *lian mizerikordon, lian amon, lian tenerecon, lian brakumon, liajn karesojn!*».

Jen kiel la Papo revas la reformojn de la Eklezio kaj ĝiaj institucioj! Kaj sankta Francisko ĉiam prezentis sin kiel reformiston de la Eklezio, kiel restaŭranton, kiu rekte ĉerpas inspiron el Dio, postulante de li *«fari, per via amo, tion, kion ni scias ke vi volas, kaj ĉiam voli tion, kio al vi plaĉas»*, kaj postulante, ke ĉiuj donu sian malgrandan kontribuadon.

En la Sankta Jaro de la Mizerikordo ni Esperantistoj estas invitataj antaŭ ĉio danki al Dio pro la donaco de la internacia lingvo Esperanto, kulturante ĝin kiel trezoron, kiun ni metas je dispono de la homaro, kiu intense serĉas pli senperan komunikadon inter ĉiuj. Kaj por esprimi pli bone tiun ĉi dankemon ni povas senti la sindevigon alproksimigi la personojn, kiuj sin sentas flankenpuŝitaj, forigitaj el la mastrumado de la socia vivo, en malfacileco pri la reciproka interkompreno. Ankaŭ nia preĝo povas fariĝi konvinkita peto por fari *«tion, kio al Dio plaĉas pli multe»*!

Dirite inter ni ...



043

BONDEZIROJ

- Ĉu vi bondeziris al viaj kolegoj?
- Jes, sed ne al ĉiuj, ĉar oficiale ni renkontiĝas hodiaŭ posttagmeze por tosti kune.
- Ĉu vere?
- Jes, tio estas kutimo ĉe nia firmao.
- Kaj kiun vi salutis, kaj al kiu vi bondeziris ĉi matenon?
- Al ĉiuj, kiujn mi renkontis: estis interŝanĝo de: "Bonan Kristnaskon", "Bonajn festojn", "Bonan Jaron".
- Jes, estas multaj manieroj por bondeziri.
- Certe. Vi povas simple diri: "Bondeziroj".
- Aŭ: "Bonan Kristnaskon kaj feliĉan Novan Jaron".
- Nun estas ankaŭ multaj, kiuj, bedaŭrinde ne festas la Kristnaskon.
- Al tiuj, oni povas deziri "Bonajn Festojn".
- Ankaŭ "Bonan Novan Jaron".
- Aŭ: "Bonan Novjaron".
- Kaj kial ne: "Bonajn festotagojn".
- Jes, vi pravas. ĉar ĉi tiuj estas ja festotagoj. sed la jaro ne komenciĝas por ĉiuj nian 1.an de Januaro.
- Vi pravas: ekzistas kalendaroj malsamaj en ĉi tiu mondo.
- Oni devas allaŭtiĝi.
- Tamen, oni povas daŭrigi per la bondeziraj formuloj.
- Ekzemple?
- "Mi deziras al vi ĉian feliĉon okaze de la festoj". Aŭ "de la finjaraj festoj".
- Kaj kion vi diras pri: "Bonan Jarfinon kaj pli bonan Jarkomenciĝon"?

AUGURI

- Hai fatto gli auguri ai tuoi colleghi?
- Sì, ma non a tutti, perché ci incontreremo ufficialmente oggi pomeriggio per brindare insieme.
- Veramente?
- Sì, è un'abitudine della nostra ditta.
- E chi hai salutato, ed a chi hai fatto gli auguri questa mattina?
- A tutti quelli che ho incontrato: è stato uno scambio di: "Buon Natale". "Buone Feste", "Buon Anno".
- Sì, ci sono molti modi per fare gli auguri.
- Certamente. Puoi semplicemente dire: "Auguri".
- Oppure: "Buon Natale e felice Anno Nuovo".
- Ora ci sono anche molti che non festeggiano il Natale.
- A quelli si può augurare "Buone Feste".
- Anche "Buon Anno Nuovo".
- Oppure "Buon Capodanno".
- E perché no: "Buoni giorni di festa".
- Sì, hai ragione, perché questi sono veramente giorni di festa, ma l'anno non comincia per tutti il nostro 1 di gennaio.
- Hai ragione: ci sono calendari diversi a questo mondo.
- Ci si deve adeguare
- Tuttavia, si può continuare con le formule augurali
- Ad esempio?
- "Ti desidero ogni felicità in occasione delle feste". O: "delle feste di fine anno".
- E cosa dici di: "Buon Fine Anno e migliore inizio"?

- Interesa formulo.
- Al kiu vi povus aldoni: “Bonan Novan Jarcenton”.
- Ĉu vi estas modesta?
- Kial?
- Ĉar vi povus diri: “Bonan Movan Jarmilon”.
- Ankaŭ: “Bone pasigu viajn festotagojn kun via tuta familio”.
- “Estu serenaj ĉi-finjaraj festoj kaj paca estu la nova jaro”.
- “Ĝojan Kristnaskon en la paco de la Sinjoro”.
- “Pacon kaj bonon por la Nova Jaro”.
- Kiom multe da bondeziroj!
- Neniam oni bondeziras multe.
- Ho, jes, oni devas deziri pacon kaj serenon al ĉiuj, ĉefe en la nuntempo.
- Fakte: tro multaj estas la homoj engaĝitaj en militoj.
- Sed ne nur bondeziri, oni devas ankaŭ agi kun sentoj de paco.
- Jes, ni komencu mem.
- Kaj ni komencu kun niaj parencoj, niaj kolegoj, niaj najbaroj, por esti en amikeco kaj en paco ankaŭ kun la fremduloj, kiuj tamen estas “nia proksimulo”.
- Nu. kion mi povas deziri al vi?
- Sanon, serenajn tagojn, ĝuadon de la Sankta Kristnasko.
- La samon mi deziras al vi.
- Pacajn festojn kune kun ĉiuj viaj familianoj.
- Dankon, dankon, mi tutkore reciprokas viajn ŝatatajn bondezirojn.
- Denove bondezirojn.
- Formula interessante.
- Alla quale puoi aggiungere: “Buon Nuovo Secolo”.
- Sei modesto?
- Perché?
- Perché potresti dire: “Buon Nuovo Millennio”.
- Anche: “Trascorri bene i tuoi giorni di festa insieme a tutta la tua famiglia”.
- “Siano serene queste feste di fine anno e il nuovo anno sia un anno di pace”.
- “Un Natale gioioso nella pace del Signore”.
- “Pace e bene per l'Anno Nuovo”.
- Quanti auguri!
- Non si fanno mai troppi auguri.
- Oh sì si deve augurare pace e serenità a tutti, specialmente al tempo attuale.
- Infatti: troppi sono gli uomini impegnati con le guerre.
- Ma non solo augurare: si deve anche agire con sentimenti di pace.
- Sì, cominciamo noi stessi.
- E cominciamo con i nostri parenti, i nostri colleghi. i nostri vicini, per essere in amicizia ed in pace anche con gli estranei, che tuttavia sono “il nostro prossimo”.
- Ebbene, che cosa posso augurarti?
- Salute, giorni sereni, godimento del Santo Natale.
- Auguro lo stesso a te.
- Feste di pace insieme con tutti i tuoi famigliari.
- Grazie, grazie, di tutto cuore, contraccambio i tuoi apprezzati auguri.
- Ancora auguri.



TRINKAĴOJ

- Ĉu vi deziras ion por trinki?
- Kion vi havas?
- Nu, mi havas sen-alkoholajn trinkaĵojn, sed ankaŭ ion alkoholan.
- Mi scias, ke kutime vi ne trinkas alkoholaĵojn.
- Jes, tio estas vera, sed kelkfoje por trinki kune kun la amikoj...
- Kaj kion vi havas en via rezervejo?
- Nu, lasu min kontroli, ĉar de longa tempo mi ne ĉerpas de tiuj boteloj.
- Ĉu ili konserviĝas bone?
- Jes, kaj oni diras, ke la alkoholaĵoj plibonigas kun la paso de la tempo.
- Ili devas esti bone fermitaj.
- Pri tio ne zorgu, mi havas tute ne malfermitajn botelojn.
- Sed mi ne volas, ke vi malfermu ilin por mi.
- Pri tio ne zorgu: estas plezuro tion fari de tempo al tempo.
- Nu, kion vi havas?
- Ĉi tie estas grapo.
- Estas du boteloj.
- Jes, sed unu estas pli dolĉa.
- Ĉu al vi plaĉas dolĉa grapo?
- Jes, mi ĝin preferas.
- Kaj kion alian?
- Tie estas rumo, konjako, tekilo.
- Kaj viskio.
- Jes, krome estas dolĉaj likvoroj plifortigitaj per ovoĵ, per herboj, ktp.
- Mi imagas, ke vi havas bonajn vinojn en via kelo.
- Ne, vinojn mi ne havas en la kelo, ĉar mi ne havas kelon.
- Ĉu vi ne havas kelon?
- Ne, mi havas nur subtegmentejon kaj vi scias, ke ĝi ne estas taŭga por la vinoj pro

BEVANDE

- Vuoi qualcosa da bere?
- Che cos'hai?
- Beh, ho delle bevande senza alcool, ma anche qualcosa di alcolico.
- So che di solito non prendi bevande alcooliche.
- Sì, è vero, ma qualche volta, per bere con gli amici...
- E che cosa hai nella tua riserva?
- Beh, lasciami controllare, poiché da lungo tempo non attingo da quelle bottiglie.
- Si conservano bene?
- Sì, e si dice che gli alcolici migliorano con il passar del tempo.
- Devono essere ben chiusi.
- Non preoccuparti di questo: ho delle bottiglie proprio non aperte.
- Ma non voglio che tu le apra per me.
- Non preoccuparti di ciò: è un piacere farlo di tanto in tanto.
- Ebbene, che cosa hai?
- Qui c'è della grappa.
- Ci sono due bottiglie.
- Sì, ma una è più dolce.
- Ti piace la grappa dolce?
- Sì, la preferisco.
- E che cos'altro?
- Lì c'è del rum, del cognac, della tequila.
- E del whisky.
- Sì, inoltre ci sono dei liquori dolci, rinforzati con uova, con erbe, ecc.
- Immagino che hai dei buoni vini nella tua cantina.
- No. non ho vini in cantina, perché non ho una cantina.
- Non hai una cantina?
- No, ho soltanto una soffitta e sai che essa non è adatta per i vini a causa del caldo.

la varmo.

- Vi estas sen vinoj!
- Kiel mi diris, mi ne trinkas kutime alkoholaĵojn.
- Sed unu glaso dummanĝe ne estas malbona ideo.
- Ĝi restas nur ideo, kaj kiam mi bezonas vinon, mi aĉetas ĝin ĉe vendejo.
- Verdire, prefere mi trinkus freŝaĵon.
- Ĉu vi deziras bieron?
- Ankaŭ tio estas alkoholaĵo.
- Sed oni trinkas ĝin volonte kiam estas varme.
- Ne, mi tute ne deziras alkoholaĵon.
- Elektu do inter “Coca Cola”, oranĝo-suko, frukto-sukoj, oranĝaĵo, citronaĵo...
- Mi ne scias...
- Ha, mi komprenas...
- Kion vi komprenas?
- Vi volas teon.
- Certe.
- Sed vi parolis pri freŝaĵo.
- Ĝuste.
- Kaj la teon mi trinkas varman.
- Ĉu estas malpermesite trinki malvarman teon?
- Ne, ankaŭ malvarman kafon oni povas trinki.
- Tio estas vera.
- Sed mi ne volas malvarman kafon.
- Kaj ĝin mi ne donos al vi.
- Ĉu vi havas malvarman teon?
- Ne, mi ĝin ne havas, sed tio ne estas problemo.
- Ĉu?
- Jes, tio ne estas problemo por mi, sed por mia edzino: Karulino, ĉu vi bonvolu prepari varman teon por ĝin malvarmigi?
- Sei senza vini!
- Com'è t'ho detto, di solito non bevo alcolici.
- Ma un bicchiere durante i pasti non è una cattiva idea.
- Rimane solo un'idea, e quando ho bisogno di vino, lo compero in un negozio.
- A dir la verità, berrei preferibilmente una cosa fresca.
- Desideri una birra?
- Anche quella è un alcolico.
- Ma la si beve volentieri quando fa caldo.
- No, non desidero proprio un alcoolico .
- Scegli allora fra “Coca Cola”, succo d'arancia, succhi di frutta, aranciata, limonata...
- Non so...
- Ah, capisco...
- Che cosa capisci?
- Vuoi un tè.
- Certamente.
- Ma hai parlato di una cosa fresca.
- Giusto.
- Ed il tè lo bevo caldo.
- È vietato bere tè freddo?
- No, si può bere anche caffè freddo.
- È vero.
- Ma io non voglio caffè freddo.
- E non te lo darò.
- Hai del tè freddo?
- No, non ce l'ho, ma questo non è un problema.
- Davvero?
- Sì, non è un problema per me, ma per mia moglie: Cara, puoi cortesemente preparare un tè caldo per raffreddarlo?

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

SERA

*Piegata sulla tua sera
tiri in porto le reti:
ricordi affiorano
dal profondo oceano
dei giorni.*

*Nel sogno
brucia il silenzio,
arde la solitudine ,
naufraga in esso la tua sete.*

*Le ultime rondini...
le prime stelle*

VESPERO

*Kliniĝinta sur via vespero
vi tiras havenen la retojn:
memoroj aperas
el la profunda oceano
de la tagoj.*

*En sonĝo
brulas la silento,
ardas la soleco,
dronas en ĝi via soifo.*

*La lastaj hirundoj...
la unuaj steloj.*

RICORDI APPANNATI

*Ricordi sepolti nel tempo
figure sfocate
dietro un vetro appannato:
giovani sorrisi lontani
chiome ribelli al vento
una bici che gira
intorno a un campo ...*

*Ineluttabile
la freccia del tempo ...
forse presentivi la "fine"
in quell'addio
che io
allora non capii
e ti maledii.
Dopo, e non ieri
per caso seppi
che tu più non "eri".*

VUALITAJ MEMOROJ

*Memoroj enterigitaj iame
diafanaj figuroj
malantaŭ opaleska vitro:
junaj ridetoj foraj
ribelaj hararoj en vento
biciklo turniĝanta
ĉirkaŭ kampo ...*

*Neevitebla
la sago de l' tempo ...
eble vi antaŭsentis la "finon"
en tiu adiaŭo
kiun mi
tiam ne komprenis
kaj mi malbenis vin.
Poste, kaj ne hieraŭ
mi eksciis hazarde
ke vi plu ne "estas".*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

I NOSTRI CONGRESSI NEL 2016

Ogni anno molteplici sono i congressi e convegni a cui possiamo essere interessati. Ricordiamo il **101-a Universala Kongreso** di Nitra (Slovacchia) dal 23 al 30 luglio e l'**83° Congresso della Federazione Esperantista Italiana** a Frascati (Roma) dal 20 al 27 agosto. È importante la nostra presenza anche in questi congressi per portare la testimonianza cristiana. Ricordiamo tuttavia in particolare quelli che più ci interessano come cattolici: i **Bibliaj Tagoj** a Baia Mare (Romania) dal 6 al 10 aprile – il **30° Congresso UECE** ad Assisi dal 3 al 7 giugno e il **69-a IKUE-kongreso** a Nitra (Slovacchia) dal 16 al 23 luglio durante il quale sarà eletto il nuovo estraro di IKUE.

Ekumenaj BIBLIAJ TAGOJ kun ADORU Baia Mare (Rumanio): de la 6-a ĝis la 10-a de Aprilo



Ankaŭ ĉijare Stefan Lepping, organizas ekumenan renkontiĝon, en kiu oni primeditos kelkajn bibliajn paĝojn, multe kantos per la kantlibro “Adoru” kaj vizitos la belaĵojn de la urbo. Estas programita ekskurso al la tradicia ortodoksa monaĥejo Birsana. El ekumena vidpunkto, Baia Mare kaj Rumanio estas interesaj, ĉar la lando estas el ortodoksa plimulto, sed ankaŭ ĉeestas multaj protestantoj kaj katolikoj. Malgraŭ sia nomo, la urbo ne estas ĉe la maro (‘Baia Mare’ signifas ‘Granda Minejo’) sed ĉe la landlimo kun Hungario kaj Ukrainio. La prezoj, de la vespermanĝo de merkredo la 6-a ĝis la tagmanĝo de sabato la 10-a de Aprilo varias de 170€ en unulita ĉambro de la bon-kvalita hotelo Roxana Imperial al 114 € en plurlita ĉambro aŭ

ankaŭ malpli. Aliĝo kaj antaŭpago de 30 € al Stefan Lepping. Informojn por la vojaĝo vi povas havi en Esperanto de Maria Laszlo (laszlo_maria@yahoo.com). Oni povas elŝuti la aliĝilon kaj havi pluajn informojn de: <http://www.ueci.it/aligxiloj>.

69-a IKUE-Kongreso

Nitra (Slovakio): de la 16-a ĝis la 23-a de Julio

Temo: VIZAĜO DE MIZERIKORDO

La temo estas elĉerpita de la Buleo, per kiu estis anoncita la “Eksterordinara Jubileo de la Mizerikordo”. Respondante al la jubilea alvoko, dum la kongreso ni havos kelkajn pilgrimadojn: ni traigos la pordojn de la katedraloj de Nitra, Bratislava kaj Trnava kaj pilgrimos al Marianka, la plej malnova Maria

pilgrimejo en Slovakio, kaj al la Kalvaria monto de Nitra.

La kongresejo estos la Porpastra seminario de S-ta Gorazd en Nitra. Ĝi situas sub la kastelo, apud la katedralo, la dioceza muzeo kaj la episkopa palaco. La loko troviĝas je ĉirkaŭ 20 minutoj de pieddistanco de la centra fer-

voja stacidomo, sed estas ankaŭ atingebla per urba buso aŭ taksio. Je la dispono estos 1-, 2-, 3-, 4- kaj 5-litaj ĉambroj. Ĉiuj ĉambroj havas apartan necesejon kaj duŝilon. Estas senpaga retaliro en ĉiuj salonoj kaj dormoĉambroj. Je la dispono al la kongresanoj estos ankaŭ senpaga parkejo por deko da veturiloj. La urbo estas atingebla, krom per aŭtomobilo ankaŭ per trajno kaj buso el Bratislava kaj Vieno.

Por la italoj la kotizoj estas:



- aliĝo: ĝis la fino de Februaro: 35 €, poste ĝi altiĝas al 50 € ĝis la fino de Majo kaj de la 1-a de Julio estos 70 €.
- la loĝado: 1-lita ĉambro: 325 €, 2-lita: 260 €, 3-lita: 240 €, 4-lita: 225 €, 5-lita: 215 €.

Nia kongreso finiĝos en la sama tago de la komenciĝo de la Universala kongreso, pro tio por la partoprenantoj al nia kongreso eblas daŭrigi la loĝadon ĉe la kongresejo por partopreni en tiu kongreso. Dum la U.K.-restado la prezoj por tranokto kaj matenmanĝo por unu persono estas:

1-lita ĉambro: po 30 €, 2-lita: 26 €, 3-lita: 22 €, 4-lita: 19 €, 5-lita: 17 €.

Pluaj informoj kaj aliĝilo ĉe:

<http://www.ueci.it/aligxiloj>.

aŭ petu al UECI-prezidanto.

Notu bone: dum la IKUE-sembleo okazonta en la kongreso de Nitra, oni voĉdonos por la elekto de la nova estraro kaj de la kont-revizoroj de IKUE. Tiuj, kiuj volas kandidatiĝi sendu sian peton al la Centra Oficejo de IKUE antaŭ la 16-a de Aprilo, adreso:

Centra Oficejo de IKUE, via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma aŭ ikue@ikue.org

El la Statuto de IKUE:

Pri la Estraro (el art. 14):

La Estraro redaktas la regularon por la prezento de la kandidatiĝoj, kiuj ĉiuokaze devas atingi la Centran Oficejon de IKUE almenaŭ 3 monatojn antaŭ la dato de la elekto. Ĉiuokaze la kandidatoj devas esti membroj de la Unuiĝo ekde tri sinsekvaj jaroj, inkluzive de la jaro, en kiu okazas la elekto, kaj devas havi la kapablon kaj eblecon plene engaĝiĝi por la laboro de la Estraro kaj devas esti minimume 18-jaraĝaj je la dato de la elekto..

Pri la Konsilo de la kont-revizoroj (el art. 16):

La Konsilio konsistas el 3 membroj elektitaj de la Asembleo kune kun la Estraro, surbaze de listo de kromaj kandidatoj minimume 18-jaraĝaj, kiuj povas ankaŭ ne esti membroj de la Unuiĝo, kondiĉe ke ĉi-kaze ili estu proponitaj de membro, kaj ke ili parolu Esperanton. Post elekto ĉiuj revizoroj devas ĉiuokaze esti membroj de IKUE por ofici. La deĵortempo de la Konsilio koincidas kun tiu de la Estraro samtempe elektita.

La tuta statuto estas legebla ĉe: <http://www.ikue.org/arkivo/statuto.html>

La nuna estraro rekomendas kaj kuraĝigas la kandidatiĝon de novaj fortoj. Se vi pensas, ke vi povas iom helpi, kandidatiĝu senprokraste. Se vi havas dubojn konsiliĝu kun la prezidanto.

30° Congresso UECI

Assisi: 3 – 7 Giugno 2016

Tema: "Voglio mandarvi tutti in paradiso"



Assisi: Basilica di san Francesco

Il tema del congresso può apparire un po' strano, ma non lo è: siamo nell'Anno Santo della Misericordia e per di più ad Assisi dove nel 1216 (800 anni fa) San Francesco pronunciò quelle parole annunciando al popolo, convenuto alla Porziuncola, l'indulgenza del Santo Perdono di Assisi. Quale luogo e circostanza più adatti per il nostro 30° congresso!

Nell'ultima assemblea generale UECI si era deciso di dare a questo congresso una veste di straordinarietà. Più che un congresso sarà un pellegrinaggio nei luoghi francescani alla luce dell'Anno Giubilare della Misericordia. Visiteremo non solo Assisi con le sue basiliche, santuari, monumenti e quant'altro, ma usciremo per immergerci nell'atmosfera francescana di Greccio, per ammirare, nella bellezza naturale della cascata delle Marmore e nelle bellezze urbanistiche di Perugia, l'opera del Creatore che ha fatto bello il mondo e l'uomo capace di bellezza e di amore.

Il *Kongresejo* sarà in un convento vicino alla Basilica di Santa Maria degli

Angeli (Porziuncola) e facilmente raggiungibile dalla stazione ferroviaria. Un programma più dettagliato vi verrà inviato con la lettera di convocazione dell'assemblea. Al solito ci saranno momenti di preghiera, di cultura e di svago, in più quest'anno celebreremo una liturgia per l'anno giubilare.

Malgrado la ricchezza del programma abbiamo tenuto i prezzi bassi: 20 euro di iscrizione, 200 euro a persona per la camera doppia e 220 per la camera singola; tutto compreso: pensione completa ed escursioni. Per motivi organizzativi è importante sapere con un congruo anticipo il numero approssimativo dei partecipanti, per cui la quota di iscrizione salirà a 40 euro dopo il mese di aprile.



Assisi: Basilica di santa Chiara


Confidiamo in una partecipazione numerosa, vi chiediamo di fare un po' di propaganda, di invitare i vostri amici e familiari. Faremo uno sconto specialissimo per i bambini.

L'aligilo vi verrà inviato con la lettera di convocazione, comunque già da ora si può compilare o scaricare dal nostro sito:

<http://www.ueci.it/aligxiloj>.

BONDEZIROJN kaj GRATULOJN

Il 26 dicembre 2015 i coniugi Lucia Zaniol e Serio Boschin hanno festeggiato il loro cinquantesimo anno di matrimonio. Al nostro presidente emerito e a sua moglie vadano le nostre felicitazioni e un ricordo nelle nostre preghiere.



NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Mentre stiamo per andare in stampa, ci giunge la notizia che il 5 gennaio è deceduto Armando Zecchin all'età di 91 anni. Nel prossimo numero inseriremo una più ampia nota commemorativa. Mentre porgiamo sentite condoglianze alla moglie e ai parenti lo ricordiamo con una preghiera di suffragio: il Signore lo accolga tra i suoi Santi.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2016 *(le quote rimangono le medesime del 2015)*

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	22,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	11,00 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	11,00 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	43,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	43,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	86,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte. I gruppi locali con almeno 10 soci trattengono 2,10 € per l'associato ordinario e 1,05 per l'associato giovane o familiare.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPITRRXXX

Nota: Sull'etichetta/indirizzo con la quale avete ricevuto questa copia di *Katolika Sento* è indicata la sigla associativa e l'anno di scadenza dell'abbonamento.

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it *(la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)*

Vice presidente: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Segretario/cassiere: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormano (MI) – tel. 02.66301958

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Addetto alla logistica: Felice SOROSINA, Via Sarnico 17, 24060 Tavernola (BG) – tel. 035.932298 –

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECl.

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati)

En Herzberg

Oni ja scias, ke Herzberg estas germana Esperanto-urbo, kie ofte kunvenas esperantistoj. Tie, urba policano haltigas eksterlandan aŭtomobilon veturantan zigzage. Ĉe la stirilo estas esperantisto ŝajne tute ebria. Kompreneble la policano sin turnas al li en Esperanto:

- Sinjoro, vi drinkis.
- Ne mi ne drinkis.
- Sed vi ja drinkis, konfesu!
- Ne, mi n-ne drinkis.
- El via stirmaniero, ĉiuj povis vidi, ke vi estas ebria.
- Kaj mi nn-ne drinkis.
- Bone! Tiukaze provu diri klare: "Tohuvabohuo".
- ...mm... mi drinkis.

Ĉe table

- Peĉjo, ĉu vi ne recitas la preĝon antaŭ ol manĝi?
- Ne! ne necesas: mia patrino kuiras bone.

Patronia

Edzino sin turnas kolere al sia edzo:

- Mi ne toleras, ke vi, kiam dum la meso oni recitas la "Patro nia", ĉe la vortoj "liberigu nin de la malbono", vi ĉiam rigardas min.

En Nov-Jorko

Rehejmeninte, maljunaj gedzoj konstatas, ke mankas la elektro. Do, ili devas supreniri piede ĝis la 46-a etaĝo. Suprenirante la ŝtuparon ŝi diras al li:

- Rakontu unu el viaj gajaj historioj por malpezigi la supreniradon; fine mi diros al vi ion malgajan.

Kiam, ili atingas, lacegaj, la 46-an etaĝon li diras:

- Nun estas via vico paroli.
- Vi devas reiri malsupren, ĉar mi forgesis la ŝlosilojn en la aŭtomobilo.

Ĉe policejo

- Kie vi loĝas?
- Ĉe miaj gepatroj.
- Sed kie ili loĝas?
- Ili loĝas kun mi.
- Kie vi ĉiuj loĝas?
- Komune.
- Kie estas via hejmo?
- Apud la hejmo de miaj geavoj.
- Kie estas la hejmo de viaj geavoj?
- Eble vi ne kredos, sed mi diras al vi la veron: ili loĝas apud mi.

En malliberejo

Du prizonuloj estas gastigitaj en nova dulita ĉelo. Unu diras al la alia:

- Kiom da jaroj vi devas ankoraŭ resti ĉi tie?
- Dudek tri jarojn.
- Do, prenu vi la liton apud la pordo, ĉar vi devos eliri antaŭe.

Kio estas drinkulo

- Paĉjo, kio estas drinkulo?
- Ĉu vi vidas tiun duopon da hundoj? Jen: la drinkulo vidas kvar hundojn!
- Sed, paĉjo! tie estas nur unu hundo.

http://www.ueci.it/k_sento/ks_2016

